## Terminologia anguleto

### Iĥn- kaj iĥt-

El la greka *iĥnos* (latine transskribita *ichnos*) = pied(spur)o kaj *iĥtis* (latine transskribita *ichthys*) = fiŝo, iom post iom deriviĝis konsiderinda nombro da diversscienсaj vortoj. Ni menciu porekzemple almenaŭ dekon da ili:

1. iĥneŭmono (laŭ PIV "ikneŭmono"!)
2. iĥnito
3. iĥnofosilio
4. iĥnogramo
5. iĥnologio
6. iĥtamolo
7. iĥtiofagio
8. iĥtiofaŭno
9. iĥtiokolo (fundamenta!)
10. iĥtiozo (laŭ la nova PIV "iktiozo"!)

Sciencistoj nepre devus kondamni la leksikan ĥaoson, kiu regas en la nova PIV (2002). Oni ja ne rajtas, redaktante tiun aŭ alian fakon, tute arbitre aŭ lasi la grekdevenan Ĥ aŭ fonetike misformi ĝin per K.

Tian fuŝan procedon ne permesas al si etnolingvoj. Tiom malpli por la zamenhofa planlingvo decu la enigma nesistemeco, precipe se temas pri sferoj pure sciencaj.

*Dr. J. KAVKA*
*Lužná 7 – Vokovice*
*CZ – 160 00 - Praha* / ĈEĤIO

### Dekronigo de kelkaj centoj da kapvortoj

Ni unue studu la aferon **statike kaj vortare**, nome per la studo de la kapvortoj en PIV-1 (1970) kaj PIV-2 (2002). Entute en PIV-1 estas 268 kapvortoj kun diftongo aŭ. Ni forigu el ili la kronon: ankau, audi, auguri, augusto… Estas 114 kapvortoj kun diftongo eŭ. Ni forigu la 114 kronojn: Europo, euforbo, terapeuto… Ni forigu ankaŭ 9 kronojn de kapvortoj kun oŭ. Do 391 kapvortoj de PIV entenis la literon ŭ (*Albault*, 1988, p.49). Ni ŝparu tiujn 391 kronojn. Ili utilas nur por ornamo!



La lingvo aperas malpli peza, pli leĝera, dum ĝi perdis nenion, nenion pli ol ĝi perdis antau jarcento, kiam oni forigis la "streketojn", kiuj ĝis tiam dividis la kunmetitajn vortojn (**Fundamento**, p. 84: frat'in'o; hodiau skribata pro klareco: frat/in/o).

Ni nun vidu la aferon **dinamike kaj entekste**

Por tio ni uzu 12-paĝan ĵusverkitan medicinan tekston, elfrancigita de la autoro, kun la titolo "Sofrologio kaj la kuracanta parolo". La manuskripto konsistas el entute 26771 karaktroj, 59 linioj kun ĉ. 73 literoj, signoj au spacoj surpaĝe. La artikolo estas intertempe publikigita en Scienca Revuo (*Albault*, 2003). En ĝi plene mankas hiatoj a'u, e'u, o'u. Aliparte mi forigis el ĝi ĉiujn kronojn. Fine, per duobla ŝanĝo el la tipo (**au** → **aux**, kaj reen → **au**) ni ricevis la nombrojn de la diversaj diftongoj. Ili estas: **au = 118** (el kiuj 1 Au); **eu = 10** (el kiuj 1 Eu); **ou = 0**, do, entute 128 kapvortoj entenantaj po unu diftongon (aŭ, eŭ). La dispartigo inter ambau diftongoj estas tute alia ol en la statika parto; vortare: 268/114; tekste: 118/10. Ni citu inter tiuj vortoj: au (38), almenau (3), ambau (4), ankau (25), ankorau (7), antau (9), autonoma (2), autoro (2), hodiau (2), kontrau (3), lau (11).

Problemo de la **hiatoj a'u, e'u, o'u**

Ili ne multas en nia lingvo, sed eĉ kleraj Esperantistoj erare prenas tiujn hiatojn au, eu, ou por diftongoj, por kiuj "oni forgesis kronojn". Oni konsideru, ke la diftongoj estas konsiderinde pli multaj kaj do aperas kiel la normo: ĉiu grupo de du vokaloj au, eu, ou estas diftongoj. Tamen estas esceptoj kaj ja ilin, sed nenion alian, oni aparte notu! Necesas konkrete ilin signi, ĉar ili malmultegas, dum necesas pozitive atentigi pri ili. Ni proponas signi ilin per disiga signo inter ambau hiataj vokaloj: ekzemple a'u, e'u, o'u (imito de diversaj lingvoj).

Cetere ili aperas nur en 14 radikoj de PIV-1, nome en Ema'uso, jesa'ulo, Kaperna'umo, Ra'ulo, Sa'udi-Arabio, Sa'ulo (entute 6 kun **a'u**); Ale'utoj, ge'umo, Kre'uzo, ole'umo, Re'unio, Se'ulo, tede'umo (entute **7 kun e'u**); no'umeno: nur **1 kun o'u** (*Albault*, 1988, p.64). Temas ja pri radikoj por **maloftaj nocioj** (5) au por **propraj nomoj** (9): ili do ne konsiderinde povas modifi la aspekton de kiu ajn kuranta teksto.